

# Pri Sergej Dakov

Antaŭ du semajnoj mi ricevis ret-mesaĝon de Miloslav Šváček, kie estis skribite:

*Kara amiko Mirek! En la monatoj novembro – decembro 2018 mi tradukis libron „Pardonu, Nataŝa“, kiun ĉi-januare kontrollegis frato Pavol Petrik. Mi ĝin tradukis espereble, ke ankoraŭ ne ekzistas ĝia esperantlingva versio, kaj krom tio ankaŭ por iom ekzerci memoron, kiu normale kun progresanta aĝo malfortiĝas. Tre kore vin salutas Miloš*

Almetita estis la traduko en PDF-formato. Mi devas konfesi, ke ĝis tiam mi neniam aŭdis la nomon Sergej Dakov, nek pri la libro "Pardonu, Nataŝa!" Scivoleme mi eklegis kaj la libro estis por mi tiel streĉa kaj interesa, ke dum tri tagoj mi povis fari nenion alian ol legi kaj legi. Mi devas diri, ke la stilo de la aŭtoro kaj de la tradukinto estas bonega, almenaŭ por mi kiel leganto. Mi trovis tie kelkajn mistajpojn kaj eĉ gramatikajn eraretojn, pri kiuj mi atentigis la tradukinton, kion li akceptis kaj korektis, sed la tradukon mi legis kun ĝuo.

Mi eksciis, ke la libron verkis 22-jara rusa oficiro, fuĝinta al Kanado, kie li rakontis pri teruraĵoj okazantaj en Sovetunio, kaj ke nelonge post apero de lia libro oni trovis lin hejme morta, kun trapafita kapo. Li estis du jarojn pli aĝa ol mi, do naskiĝis en 1951 kaj mortis en 1973.

Sergej rakontas, ke li estis telegrafisto sur sovetia ŝipo, kiun proskime de Kanado kaptis ŝtormo. Kapitano ordonis al li peti permeson de kanadanoj, ke la ŝipo povu proksimiĝi al la bordo, en la kanadajn akvojn, por traatendi tie la ŝtormon. Sergej decidiĝis, ke li uzos la okazon por fuĝi. Li ŝajnis malsanon, petis, ke oni lasu lin dormi kaj ŝlosis sin en sia kajuto. Sed sekrete li elglitis, preskaŭ noktomeze saltis en furiozantan akvon kaj naĝis sub la akvonivelo kiel longe li povis. Poste li elakviĝis nur por preni novan aeron kaj denove subakviĝis. Poste li naĝis kvar horojn, ĝis li fine svenis.

En la sekvaj ĉapitroj li rakontas, ke kiam li estis kvarjara, lia patro estis akuzita pri ŝtatperfido kaj mortigita. La malfeliĉa patrino mortis post kelkaj monatoj kaj orfon transprenis parencoj. Sed ilia filo malamis la novan infanon, ĵaluzis kaj eĉ provis lin mortigi, dronigi en bankuvo, kiam la etulo banis sin. Tial Sergej forkuris el la hejmo kaj al policianoj diris, ke li ne memoras sian nomon. Oni metis lin en infanhejmon. Tie regis kelkaj komunistoj, kies tasko estis eduki el la infanoj estontajn komunistojn. Estis tie ankaŭ infanoj, kiuj ne estis orfoj, sed ĉar iliaj gepatroj estis religianoj, oni deklaris ilin ne kapablaj eduki infanon kaj metis ĝin en infanhejmon.

La homoj laborantaj en la infanhejmo malamis la infanojn, ĉar ili ne venis tien propravole. Ili ricevis kiel partian taskon zorgi pri la edukado de orfoj, tial oni vidis en tiu laboro finon de sia partia kariero kaj ĉiun koleron ili elverŝis sur la etulojn. Draŝadon ili nomis vitamino. Sergej baldaŭ ellernis, kiel eviti konfliktojn kun tiuj homaĉoj. Li estis bone evoluinta, ĉiuj lin supozis je du jaroj pli aĝa ol li efektive estis. Li estis bona sportisto kaj lerte lernis, do oni destinis lin por armea mezlernejo. Li estis komence tiel nomata fajrero, poste pioniro kaj fine en la mezlernejo komsomolano. Baldaŭ oni eĉ nomis lin prezidanto de la loka komsomolo en la kamĉatka urbo Petropavlovsk.

En la armeo oni instruis al la knaboj precipe marksismon-leninisman kaj ke la plej danĝeraj malamikoj estas kredantoj, pli danĝeraj ol ŝtelistoj kaj murdistoj, ĉar ili subfosas la socialisman ŝtaton. Kiam li estis proksimume dekokjara, tiam li estis ĉampiono pri ĵudo, oni faris el li kaj aliaj knaboj, ĉampionoj pri bokso, atakan grupon. Danke al spionoj ili sciis, kie la kredantoj kunvenas. Ilia tasko estis ilin surprizi, draŝi kaj la predikanton aresti. Ĉion oni devis fari sekrete, ĉar en la konstitucio de Sovetio estas skribite, ke ĉiuj homoj havas religian liberon. La ŝtato eĉ eldonis Biblion oficiale, sed disdonis ilin al komunistaj funkciuloj, por ke ili konatiĝu kun libro de la malamiko. La kredantoj mem havis bibliojn kontrabanditajn el eksterlando kaj kopiitajn per tajpilo aŭ eĉ per mano. Tiujn la grupo devis konfiski.


Sergej partoprenis pli ol 150 tiajn atakojn, sed fine lin surprizis knabino Nataŝa, kiu li kaptis trifoje, kaj kvankam ŝi estis batita, ŝi ne ĉesis kredi. Tio skuis la konsciencon de Sergej.

Foje okazis granda komunista soleno, kiun gvidis funkciulo Orlov. Li donis al Sergej medalon kaj ĉirkaŭbrakis lin. Poste estis festeno. Sergej tie eltenis unu horon, sed poste decidis iri hejmen. Sed en la koridoro lin renkontis Orlov kaj entiris lin en pordon, kie estis ĉambro por altaj funkciuloj. Sergej miris, ĉar sur la tabloj estis multe pli da manĝo ol ekstere por ordinaruloj, sed ĉiuj funkciuloj jam kuŝis sur la planko ebriaj. Ankaŭ Orlov estis ebria, montris al Sergej cikatron sur sia kruro kaj kriis: "Tion faris al mi tiu bastardo Stalin. Komunismo estas la plej granda fiaĵo, sed la homo obeas, povas fari karieron." Poste ankaŭ li ekdormis, Sergej elglitis, sed poste komencis timi. Se Orlov post sobriĝo rememoros, kion li rakontis pri Stalin, Sergej por li estos danĝera kaj eble li likvidos lin.

Tamen Sergej decidis, ke li ne plu faros raziojn kaj transiros al mararmeo. Li eĉ sekrete kaŝis unu el la konfiskitaj libretoj kaj legis ĝin por ekscii, kial la kredantoj tiom kredas, ke eĉ draŝado ilin de deturnas de ilia kredo. Oni persvadis lin, ke li restu kaj plu raziu, sed poste oni diris: Iru ripozi sur la maron kaj post unu jaro vi revenos kaj atendas vin brila kariero ĉe KGB.

Tial li decidis fuĝi, prefere morti ol reveni. Ĉe la usona bordo li ne povis, ĉar Usono havis kontrakton kun Sovetio, ke ili reciproke transdonos al si dizertintojn kaj ĝuste antaŭ nelogne redonis al Sovetio soldaton, kiu fuĝis al Usono por akiri liberon. Nur ĉe la kanada bordo li decidis riski.

Kiam li perdis konscion en la akvo, li vekigis en prizona hospitalo kaj parolis al li homoj angle, sed li la anglan ne komprenis. Fine venis rusa interpretisto kaj klarigis, ke iu virino trovis lin sur la marbordo, ĉar la ondoj elĵetis lin tie. Kaj ke Sovetio jam postulis, ke li estu redonita. Sed en Kanado la organizoj pri homaj rajtoj faris grandan kampanjon, ke li ne estu redonita. Ili aranĝis diskutojn kun li kaj publiko, kie li rakontis pri la persekutado de religianoj en Sovetio kaj verkis eĉ libron. Li ricevadis minacajn leterojn kaj fine oni trovis lin mortigita. Li havis 22 jarojn.



*Sergej K. Dakov*